

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

===== LA HOUSSAYE EN BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE =====

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Roger Salengro, DRANCY, (Seine)
Help-sekretariino : F-ino LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS -14-
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-les-GONESSE
C.C.P.- PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr-, Adhésion à la Ligue : 1 Fr-; Total = 3 Fr--
=====

- N° 67 --- BULLETIN. TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ---
Sankta PIO X-a, preĝu por ni . +++ Oktobro 1965 +++

ENHAVO :

paĝoj :	1,2	Amo kunligu nin ...
	2 4	Vortoj de l'Papo ...
	2,3,4 -	Letero de nia Prezidanto
	5 -	Prières de la messe en Espéranto ...
	5 -	Nouvelle édition d'un némuro spécial ...
	5 -	Radio "Vatican" ...
	5 -	Rétificatif
	5,6 -	Impresoj pri la ora jubileo 50-a U.K. en Tokio...
	6 -	Fakkunsido de I.K.U.E. en Tokio ...
	6 -	Memore al Daniël-Rops ...
	7 -	Ni funebras ...
	7 -	Por la kotiz-tempo

+++++

AMO KUNLIGU NIN ...

=====

... Nĉvan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu la alian.
Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos
amon unu al alia... (el Sankta-Johano : 13 - 34/35-)

... ĉia akreco kaj indigno kaj kolero kaj voĉbruado kaj kalumnio
estu formetitaj el inter vi, kune kun ĉia malico.; kaj estu bonfaraj
unu al alia, kiel ankaŭ Dio en Kristo pardonis al vi...
(el Efesanoj : 4 - 34/35-)

... Ĉar vi estas ankoraŭ karnaj; ĉar dum ekzistas inter vi
jaluzo kaj malpaco, ĉu vi ne estas karnaj kaj iradas laŭ la maniero
de homoj ? Ĉar kiam unu diras : Mi estas de Paŭlo; kaj alia : Mi
estas de Apolos; ĉu vi ne estas homoj ?
(el Korintanoj I:- 3 - 3/4-) .../...

... Tial, se vi prezentas vian oferon ĉe la altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon. Konsentu rapide kun via kontraŭulo, dum vi estas kun li sur la vojo, por ke la kontraŭulo ne transdonu vin al la juĝisto, kaj la juĝisto al la subulo, kaj por ke vi estu ĵetita en malliberejon. Vere mi diras al vi, ke vi neniel eliros el tie, ĝis vi pagos la lastan kodranton....

(el Sankta Mateo : 5 - 23/26-)

.....

~ Vortoj de l' Papo ~

Ni ĉeestas la teruran pligraviĝon de antagonismo inter popoloj en diversaj mondpartoj. Ni vidas reigi la danĝeran fenomenon, kiu uzas ne la traktadon sed la armilojn por solvi la malfacilaĵojn inter la kontraŭuloj. Tial la tutaj enloĝantoj de nacioj suferas neesprimeblajn suferojn pro ribeloj, geriloj, militagoj. Tiuj ĉi pligrandiĝas kaj pli fortiĝas; ili postmomente povus ekfajrigi novan kaj vere terurigan konfliktegon.

Ni solene admonas ĉiujn responsulojn pri publikaj aferoj, ke ili aŭdu la tutmondan sospiron al la paco. Ili faru ĉion, kion ili povas, por savi la minacitan pacon. Ili daŭrigu iniciati kaj favorigi la konversadojn kaj traktadojn je ĉiuj niveloj kaj momentoj por haltigi la danĝeron rekuron al la armiloj, kies konsekvencoj estas priplorindaj laŭ materia, spirita kaj morala vidpunkto. Gvidite per laŭjuraj reguloj, oni klopodu iri renkonten al ĉiu vera kaj sincera deziro al paco kaj justeco, por plifortigi kaj sukcesigi ĝin. Oni fide apogu ĉiun senartifikan geston de bona volo, tiamaniere ke oni superigu la konkretan kaŭzon super tiu de la malordo kaj ruinigo.

(Encikliko en la monato majo ...)

+++++

Letero de nia Prezidanto =

La lasta kunveno de nia Komitato okazis la 26-an de Septembro; ĝi plejparte estis dediĉita al :

Informado pri Esperanto

Je instigo de nia membro S-ro RIBOT, la komitatanoj de Franca Ligo pristudis la prezentadon de Esperanto al la franca Episkoparo. Komence de Septembro, ni sendis al ĉiu Episkopo koverton entenantan : ekzemplerojn de "Espero Katolika". "Vojo, Vero, Vivo", "Nova Civito", folion kun elementoj de la esperanta gramatiko, kaj leteron el nia Prezidanto.

Ni esperas, ke nia sendado faciligos la enpenetrigon de Esperanto en katolikajn mediojn.

Jen la teksto de la letero de nia Prezidanto /



LIGUE FRANÇAISE CATHOLIQUE ESPÉRANTISTE

(Adresse du Président) : Mr. R. Cl. COLAS, 6, rue de Mézières
PARIS -6-

Paris, le 6 Septembre 1965.

Votre Excellence,

Avec l'ardent désir d'apporter le témoignage de leur Foi partout où des échanges intellectuels et spirituels sont possibles, des catholiques utilisant et pratiquant la langue internationale Espéranto ont formé, à l'intérieur du mouvement espérantiste universel, une Union Catholique.

Né au début de ce siècle, et répandu dans toutes les parties du monde, le Mouvement espérantiste a pour objectif la création de rapports directs, de pays à pays, au moyen d'une langue internationale. L'Espéranto simple en ses éléments, d'une étude facile par sa logique gramaticale comme par les bases vraiment internationales de son vocabulaire en est le moyen matériel.

Le dynamisme de ce mouvement naît de la possibilité de contact favorisant les rapprochements sur le plan culturel facilitant des rencontres, des correspondances, des échanges de vues, dont des manifestations telles que les congrès annuels ou les "Universités d'été" démontrent l'efficacité.

Outre ces assemblées où l'emploi d'une langue unique, tant en séance de travail que dans les conversations individuelles, crée des rapports aisés entre les participants, l'Espéranto possède une presse variée lue dans toutes les parties du monde, faite en grande partie d'organes spécialisés et de revues culturelles. Une importante littérature, traduite ou originale s'imprime chaque année en Espéranto; les lettres, les sciences, les idéologies, comme le tourisme, le loisir ou la curiosité y ont leur part.

Dès 1910, un groupe international animé par de fervents chrétiens s'est créé. Dans les manifestations générales comme les Congrès internationaux, ils ont représenté la part du Spirituel, organisant des réunions, conviant les participants à célébrer ensemble la Sainte Messe, priant pour le rapprochement des peuples et pour l'unité des chrétiens. La revue "ESPERO KATOLIKA" a été fondée à cette époque, et n'a cessé de paraître, temporairement, que pendant les conflits mondiaux. Des livres chrétiens sont

.../...

édités, parmi lesquels une traduction de l'Encyclique "Pacem in Terris" a eu en son temps un certain retentissement dans la presse de toutes tendances; une institution de religieux, qui s'est spécialisée dans un apostolat d'information sur l'enseignement et la vie de l'Eglise, pratique en Espéranto une catéchèse par correspondance et publie un bulletin intitulé : "VOJO,VERO,VIVO."; une revue "NOVA CIVITO" a pour esprit la foi dans le monde moderne; enfin, de nombreuses associations nationales publient des bulletins à l'usage de leurs membres.

Créer un lien sans barrière de langues entre chrétiens, mettre ce moyen providentiel au service de la Foi et de la Charité, favoriser, avec le rapprochement des coeurs et des âmes, la recherche des vraies bases de la Paix et de l'Eglise, tels sont les buts que recherche humblement l'Union Internationale des Catholiques Espérantistes (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista).

Modeste en effectifs et en moyens, notre Ligue Française, membre de cette union, veut travailler de toute son âme dans ce sens en liaison avec nos frères de nombreux pays de tous continents.

Il nous apparaît souhaitable que l'idéal qui nous anime soit proposé aux jeunes des mouvements catholiques attirés par une action internationale, aux mouvements d'A.C. ou de spiritualité, aux séminaristes aussi, pour que les multiples possibilités de cette langue soient vraiment mises au service de l'apostolat et de la louange de Dieu.

C'est pourquoi nous nous permettons de demander à nos Pasteurs et nos Guides, avec leur bénédiction pour nos humbles efforts, leurs encouragements et leurs conseils; nous formons le voeu de voir des prêtres comprendre et animer spirituellement nos groupes, afin qu'ils se forment une âme plus évangélique, dans le sens inspiré par l'Esprit Saint au Concile, et dans la ligne tracée par le Souverain Pontife, pour le Règne universel de Jésus-Christ dans l'Unité.

Daignez agréer, Monseigneur, l'hommage de mon profond respect, avec lequel j'ai l'honneur d'être, de votre Excellence, l'humble et dévoué serviteur,



René-Claude COLAS.

Président de la
Ligue Française Catholique Espérantiste.

.../...

Mi parolis kun dekoj kaj dekoj da afablaj amikoj, ĉiam helpe-
maj, ĉiam perfekte kvietaj kaj ĝentilaj, ĉiam ege modestaj kaj
kuraĝaj, eĉ en kelkaj kazoj heroaj.

Cent-paĝa bulteno ne sufiĉus por priskribi ĉiujn miajn impresojn.
Pli simple, venu al "Les Andelys".

la 11-an de Decembro, vespere.

Vi aŭdos ilin pli komplete kaj samtempe ĝuos kelkajn lumbildojn
en mia bela urbdomo.

Dimanĉon 12-an, ni povos aranĝi komunan tagmanĝon se montriĝos
sufice da interesuloj por festi la Zamenhof-tagon.

DUM LA MANĜO, ONI PAROLOS NUR E S P E R A N T O N.

Bona okazo por praktiki la lingvon ! Ne preterpasu ĝin !

Prezo de la manĝo : 12 fr -- (Ĉio entenata)

Anoncu vin al : S-ino J. VINCENT, LES ANDELYS (Eure)

(C.C.P.) P.ĉ.k. - Rouen - 574-88-M.-

ĝis la 30-an de novembro 1965.

---:---

FAKKUNSIDO DE I.K.U.E. en TOKIO ...

En la Universala Kongreso en Tokio okazis fakkunsidon de
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - IKUE - sub la prezido
de F-ino Ĉisato Yamagata. Prelegis : Sac. Bekers pri "Mallonga
historio de IKUE", kaj Pastro S. Knorr pri "Ekumenismo kaj Esperanto".

Katolika Diservo okazis dimanĉon la 1-an de aŭgusto en la
ĉefepiskopa katedralo de Tokio. Meson kaj predikon faris Sac. Beckers,
prezidanto de IKUE. Sac. Thalmaier, el Germanujo, legis la bibliajn
tekstojn kaj gvidis la komunan preĝadon kaj kantadon en Esperanto;
Ĉiuj tekstoj de la sankta meso, kiuj laŭ la nova liturgio estas
recitataj en la naciaj lingvoj, estis recitataj en Esperanto; tio
okazis la unuan fojon en la Universala Kongreso de Esperanto. Krom
la eŭropaj kaj usonaj esperantistoj, ĉeestis ankaŭ japanaj : entute
180 personoj.

P. Knorr (el "Espero Katolika")

=====

MEMORE AL DANIEL-ROPS.

Daniel-Rops mortis : jen grava perdo por ĉiuj, kiuj interesiĝis
pri la historio kaj la vivo de la Eklezio. ! Sed Daniel-Rops estis,
ne nur la sciencoplana verkisto, la talentoplana historiisto, la
prestiĝa ano de la Franca Akademio, kaj la ŝatata direktoro de la
revuo "Ecclesia" ; li estis vera kristano, ĉiam preta vidi en la
klopodoj de sinceraj homoj la instigon de la Sankta Spirito, kaj
tial, ekzemple, li estis tiel amika al Taizé. Kvankam nia voĉo
estas tre malforta, ankaŭ ni eldiru nian dankemon al Daniel-Rops,
kiu dufoje afable permesis al ni traduki Esperanten el "Ecclesia".
